1-a Jaro, N-o 24

APERAS S.A.T. SEMAJNE

12. Marto 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Gvidanto: E. LANTY
24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI.

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Japan-sovetia traktato

Dum pli ol 1½ jaroj daŭris traktadoj inter Japanio kaj Sovet-Unio pri restarigo de normalaj interlandaj rilatoj. Tiuj ĉi traktadoj finiĝis sukcese per subskribita ambaŭflanke traktato en januaro de 1925 j. La apetitoj de japanaj imperialistoj, kiujn la lastaj elmontris dum la konferenco, estis moderigitaj de tiu ĉi ĵus atingita traktato.

Kompreneble ne al lerteco de ruĝaj diplomatoj oni ŝuldas tiun ĉi traktaton, kiu nun havas tutmondan signifon. Nesufiĉa bonstato de l' enlanda ekonomio de Japanio mem estis la kaŭzo, kiu cedemigis japanan registaron kaj moderigis la apetitojn de japanaj patriotoj.

Post japan-rusa milito dum 1904—05 j. Japanio rapide progresis laŭ vojo de l' industria evoluo. Tamen ĝia industrio estis senigita je la plej necesegaj krudaĵoj. Japana metalurgio bezonas importendan karbon kaj ercon. Japanaj teksuzinoj fabrikas el importata kotono kaj lano. En la sama situacio troviĝas la aliaj branĉoj de japana industrio. El tiuj ĉi ekonomiaj kondiĉoj kreskis la tendencoj de japana imperialismo. Naturkaŭze, la japana kapitalo serĉis aplikeblon ĉe grandaj naturriĉaĵoj de najbara Ĉinio, kiu fariĝis ĉefa bazo por japana industrio. De tie oni importas karbon, ercon, nutraĵojn k. c. Ĉinio samtempe estas merkato por vendado de industriaj produktaĵoj de Japanio. Tamen sur tiu ĉi merkato japana kapitalo renkontis fortajn konkurantojn — Anglio kaj Usono.

En serĉado de novaj merkatoj japana kapitalo turnis sian atenton al ceteraj najbaraj landoj, kuŝantaj apud Pacifika Oceano. Ĉar tiuj landoj estis ankaŭ kolonioj de angla aŭ usona kapitalo, tial la aktivema burĝaro de Japanio instigis la registaron pligrandigi la armadon tiel, ke baldaŭ Japanio fariĝis unu el la plej potencaj kaj agresivaj landoj.

Ĉio ĉi kompreneble pliakutigis antagonismon inter Japanio kaj aliaj pretendantoj por hegemonio en Ĉinio kaj sur Pacifika Oceano.

La pliiĝo de japana loĝantaro rezulte de konstanta elmigrado komencis japanizi apudajn bordojn de l'kontinento; la elmigrado aperigis japanajn loĝantojn en Norda Aŭstralio kaj Suda Ameriko k. a. Tiu ĉi elmigrado fariĝis la kaŭzo de nova antagonismo kun anglaj dominatoj kaj Usono. Sub forta rezisto de l'dominatoj kaj sub influo de Usono dum Vaŝingtona konferenco en j. 1921 Anglio neniigis sian interkonsenton kun Japanio. Post tiam la lasta nur propraforte devis rezisti kontraŭ potenca pretendanto por la hegemonio sur Pacifika Oceano — Usono.

La pretendo de Usono por influo en Malproksima Oriento tute malbonigis la situacion de Japanio. Juna japana kapitalo ne povis longe konkuri kontraŭ pli maljunaj kaj potencaj konkurantoj kaj komencis liberigi unu pozicion post la alia. La tertremo, okazinta aŭtune 1923, detruis la plej gravajn branĉojn de japana industrio kaj per malfacile kuraceblaj vundegoj sur ĝia korpo ankoraŭ pli grave malbonigis la ekonomian staton de la lando.

Samtempe Usono, ĉiam konsideranta Japanion kiel la plej potencan kontraŭulon en la lukto por hegemonio sur P. O., utiligis por siaj celoj malfacilan situacion de Japanio, kiu kreiĝis por la lasta rezulte de l'tertremo kaj industria depreso. Por ankoraŭ pli malfortigi Japanion Usono malpermesis japanan elmigradon en Usonon kaj la samon okazigis por sud-amerikaj landoj.

Por unu momento la lastaj okazintaĵoj en Ĉinio (vidu "S-ulo" 16) ŝajnis plifortigi la poziciojn de l'japana kapitalo. Sed tiu plifortiĝo tuj okazigis respondan agon flanke de l'amerika kapitalo, kiu ne nur siacele subtenas la generalojn de ĉinia registaro, sed aktive minacas al Japanio mem.

Sufiĉas noti la fakton, ke usona ministerio por mar-aferoj oficiale anoncis pri manovradoj de sia ŝiparo apud japana insularo. Samtempe la ĵurnaloj informas, ke l'registaro de Bolduin projektas konstruadon de haveno por militŝiparo en Singapur.

Ĉe tiaj kondiĉoj la plua ignorado de Sovet-Unio ne estus sendanĝera por Japanio.

La sola potenca lando en Malproksima Oriento, kiu rilate al Japanio ne estas agresiva, estas Sovet-Ruslando. Ĉiuflanke premata, de ĉie minacata de siaj agresivaj konkurantoj kaj nun ekonomie malforta Japanio estis devigata uzi nur solan elirpovon el la malbona situacio: nepre obtenendan traktaton kun Sovet-Ruslando, kiu akcelus la disvolviĝon de japana komerco kun Ruslanda Oriento kaj havigus al Japanio ne minacatan dorsfronton en eventuala milito.

Rezulte de sovet-japana traktato antaŭ Japanio malfermiĝos belaj perspektivoj por ekonomia renaskiĝo de la lando. Japanio post la tertremo ekstreme bezonas lignomaterialon, bezonas ankaŭ nutraĵojn, felojn ktp. Japana ŝiparo kaj la industrio bezonas nafton. Ĉion ĉi japana popolo

ricevos per intensigotaj komercaj rilatoj kun Sovet-Ruslanda Oriento.

Ke la ekonomia stato de Japanio ĝis nun estis ĉiam pli malboniĝanta, ilustras ankoraŭ kelke da faktoj. La pasinta 1924 jaro finiĝis por Japanio kun granda pasivo en komerca bilanco. La provoj pligrandigi eksporton de l'teksaĵoj kaj silko, malgrandigi elspezojn por l'armeo ne sukcesis, — kaj rezulte la or-provizo de Japanio, kalkulita 1921 en sumo de 2 155 milionoj da ienoj[1]), malkreskis ĝis 1 000 milionoj. La ŝparitaj dum imperialisma milito ekonomiaj valoraĵoj iom post iom estis disĵetitaj. La malbona rikolto de rizo en koloniigita Koreo malgrandigis eksporton de ĝi por metropolio kaj per tio ankoraŭ plimalbonigis la nutradon de l'popolo. Pro postsekvoj de l'tertremo, ekonomia depreso, la atmosfero de l'enlanda vivo saturiĝis per popola malkontento. La nova japana registaro, prezidata de Kato, efektivigis neniun el siaj promesoj pri ekonomia restarigo de la lando. Tra tuta lando fluas la ondo de agraraj konfliktoj, laboristaj strikoj, akompanataj de kreskanta ribelemo kontraŭ nuna registaro.

Samtempe kreskas simpatioj por Sovet-Ruslando en laboristaraj masoj kaj etburĝaro, kiu soifadis restarigon de normalaj rilatoj kun Sovet-Unio.

Ĉio ĉi kune konsiderata instigis nunan registaron de Japanio cedi en kelkaj "malfacile digesteblaj" demandoj kaj per tio nun faktigi japan-sovetan traktaton.

Tiu ĉi traktato okazigos novan grupiĝon de la fortoj en demandoj pri Pacifika oceano. Usono, post kiam Japanio akiris certajn poziciojn dank' al interkonsento kun Sovet-Unio, estos devigita ŝanĝi sian politikon rilate al ĝis nun ignorata Sovet-Unio. De tiu ĉi vidpunkto la traktato havas internacian signifon kaj estas taksebla kiel la nova grava venko de l'ruĝa diplomatio.

N. Krassovski.

TRA LA KLASBATALO

La kurdaj gentoj en Turka Azio ekribelis kaj okupis kelkajn regionojn. La turkoj kontraŭmobilizis kaj estas repremantaj en malfacilaj neĝaj cirkonstancoj la atakantojn.

La sveda ministroprezidanto Branting mortis. Li estis konata en la socialista movado.

La unua regna prezidanto de Germanio Friedrich Ebert estas mortinta. La burĝa gazetaro en siaj nekrologoj danke kvitancas lian lukton kontraŭ la bolŝevismo.

La svedaj entreprenistoj minacas per lokaŭto 130 000 laboristojn.

En Bulgario estas mortigitaj, dum hela tago sur la strato de la faŝista registara kliko mortigista, du proletaj gvidantoj.

1) japana mono.

El Litovio

Litovio, unu el la baltaj ŝtatoj, estas regno de la pastraro. Pastroj tie ĉi havas plejan aŭtoritaton. Estro de l' ŝtata banko estas pastro, prezidanto de l' parlamento (Seimas) estis pastro, nun li estas vicprezidanto, ministro de l' agrikulturo — pastro, ĉefbankisto de l' unu plej riĉa komerca banko — pastro, rektoro de l' universitato ankaŭ pastro. Krom tio la pastroj partoprenas multajn aliajn entreprenojn. Ekzemple: la lernejoj estas sub ega influo de l' pastraro; nur dank' al profesia asocio de geinstruistoj oni ne povis ĝis nun entute subigi lernejojn. Multaj geinstruistoj estas persekutataj.

La politikaj partioj estas jenaj: Asocio de mastroj (U. J.), Kristanoj-demokratoj, Federacio de laboro, kvazaŭ laborista organizaĵo, sed vere ĝi estas burĝa kaj kristana, ĉar deputatoj de l' federacio en parlamento ĉiam voĉdonas laŭ ordono de Kristanoj-demokratoj, same faras ankaŭ Asocio de mastroj, tiel ke ĉiujn tri partiojn oni devas konsideri kiel unu burĝec-kristanan partion. Kvara partio estas Asocio de vilaĝanoj popolaj. Tiu ĉi partio efektive estas reprezentanto de burĝaj vilaĝanoj, kvankam ĝi sin nomas asocio de etterposedantoj kaj senteruloj. Finfine laboristoj havas du partiojn, socialdemokratan kaj komunistan. Socialdemokratoj agas malkaŝe kaj en parlamento havas 8 deputatojn; partio komunista estas malpermesita kaj komunistoj agas sekrete.

Litovio estas lando de blanka teroro, kiel ankaŭ la aliaj baltaj ŝtatoj. Malliberejoj plenplenaj de arestitoj, kaj ankoraŭ oni arestas. Antaŭ nelonge oni arestis ĉirkaŭ 100 personojn. En Panevezys estas arestitaj: D.ro Domaŝeviĉius, tuta frakcio de laboruloj de urba konsilantaro, ĉiuj membroj de l' administracio de profesia asocio kaj aliaj; en Vilkoviŝkis 30 p., en Mariampole d.ro St. Matulajtis kaj ankoraŭ 14 p. Kiom oni arestis en Kaŭnas kaj aliaj urboj, pri tio mankas al mi la scio. Ĉiuj arestitoj estas kulpigataj kiel komunistoj.

En lando regas senlaboreco. En Kaŭnas estas ĉ. 5340 senlaboruloj, en Ŝaŭliai pli ol 1000, en Panevezys pli ol 1000. Kiom da senlaboruloj estas en aliaj urboj, mi ne scias, ĉar neniu zorgas pri senlaboruloj kaj ilin registras. Laboristoj postulas laboron, sed registaro ĝin ne donas. 19. jan. senlaboruloj kolektiĝis en Kaŭnas sur placo. Neatendite sin ĵetis sur ilin rajdaj policistoj kaj batante ilin dispelis. Sekvo: oficiale estis du vunditoj per revolveroj kaj multaj disbatitaj.

Eble ne superflue estos mencii, kiel vivas proletaro en vilaĝo. Bona laboristo ricevas de 500 ĝis 800 lidojn (lido — 0,1 dol.) pojare kaj ĉiun provizon: nutraĵo, vestaĵo, piedvestoj k. a. Malpli bona de 300 ĝis 500 lid. Laboristinoj 250—400 lid. Paŝtisto aŭ paŝtistino (10 ĝis 14 jaraj geknaboj) 100—200 lid. Ĉio estas tute regulata nur de mastro. Ili laboras de mateno ĝis vespero. Tiel malmulte ili ricevas pro tio, ĉar malmultaj nur estas organizitaj en Profesia Asocio.

SAT-ano 1747.

Voĉo el Polio

"En Polio blanka teruro ne estas", jen decido de komisiono de franca ruĝkruco, kiu ekkonatiĝis kun cirkonstancoj de politikaj malliberuloj. Strange estas, ke ĉi "komisiono" ne aŭdis ĝemojn kaj vekriojn de enkarcerigitoj nek vidis iliajn vundojn. Ili ne vizitis malliberulhospitalojn, kie homoj kuŝas kun rompitaj ripoj, ftizmalsanuloj, kies malsanoj kaŭzitaj de l' batoj kaj malbona nutrado. La musojn, kiuj formanĝadis la vestaĵojn de l' malliberuloj kaj eĉ homojn tuŝas, ili ne vidis . . . Procesojn kie la advokatoj protestante forkuras el la salonoj de "justeco", tial ke plendoj de juĝatoj ne estis atentataj, ĉar oni ilin senkompate turmentadis kaj ĉiujn antaŭajn konfesojn oni perforte eldevigis per turmentado kaj torturoj, — ili ne vidis . . . Ili ne scias, ke ĉi homoj sidas senkulpaj, nur ĉar ili legis suspektitajn je komunismo librojn aŭ gazetojn, aŭ pro promenado en la loko kie en la sama tempo okazis kunveno de komunistaj delegitoj (en Chelm). Oni enkarcerigas homojn antaŭ la proceso, kiuj antaŭ du jaroj estis liberigitaj por unu miliono da polaj markoj (kiu egalis cent dolarojn amer.!) kiel kaŭcio, kaj kiu nun egalas dek centojn da dolaroj. Oni ilin enkarcerigis antaŭ la proceso, ĉar la kontraŭuloj timas iliajn influojn je la elektoj de prezidantaro en la lublina malsanulkaso. Ili ne scias, ke oni homojn retenas en la karceroj antaŭ la procesoj kelkajn jarojn; ke oni enkarcerigas kvar laboristajn sejmdeputatojn malgraŭ ilia netuŝebleco! Ili ne scias ke la prezidanto de l' pola respublikaĉo donis ordenojn al la fidefensivgvidantoj por efika perforta forigo de l' revoluciuloj. Do estas kompreneble, ke la komisionon oni trompis.

Pli longe silenti ni ne rajtas!

La proletaro de l' tuta mondo povas protesti kontraŭ tiuj mezepokaj barbarecoj! Tiu ĉi alvoko devas esti nepre enpresita en ĉiuj laboristaj kaj demokrataj gazetoj de l' tuta mondo. Malhonoro al ĉiuj subpremantoj kaj iliaj helpantoj!

Nietŝrelav, Lublin.

La kristanismo eniris en sian lastan stadion. Ĝi perdis kapablon por estonta tempo servi kiel ideologia kovraĵo por aspiroj de iu progresema klaso, ĝi pli kaj pli aliformiĝis en monopolon de la regantaj klasoj, kiuj faris ĝin simple regilo, per kiu estas bridataj la malsuperaj klasoj.

Marks.

VARBU POR VIA GAZETO!

Faŝismo en Latvio

Antaŭ proksimume 4 jaroj fondiĝis en Riga t. n. "Latvia Nacia Klubo", protektata de tiama registaro. Tuj post ĝia ekfunkcio sufiĉis kelke da tagoj por evidentigi la veran fizionomion de tiu fiorganizaĵo. Ebriiĝado, skandaloj surstrate, en teatroj, stacidomoj kaj trajnoj estiĝis ĉiutaga fenomeno. Kiel "nacia" organizaĵo, semanta kaj fortikiganta latvan nacian kulturon, ĝi estis subvenciata de fabrikantoj-spekulantoj, komercistaĉoj, restoraci- kaj dommastroj. La membraro plej parte konsistis el studantoj, lernantoj kaj parte el caraj eksoficiroj kaj ĝendarmoj. Dum regado de t. n. granda koalicio kiun partoprenis ankaŭ social-demokratoj, finaciuloj jam koloriĝis pure faŝiste ne nur per siaj vestaĵoj, uniformoj apartaj, sed plej parte per siaj fiagadoj, mokado kaj atakado de laboristoj kaj iliaj instituoj. En jaro 1923 ili multnombraj, armitaj per bastonegoj, malbonodoraj fluidaĵoj, ŝtonoj kaj revolveroj sub gvidado de la "nacia klubo" sur Esplenado (centrurba placo) atakis la laboristan 1 majan festkunvenon, vundinte proksimume 30 personojn, kaj rompinte kaj disŝirinte la ruĝajn standardojn. La edzino de parlamentprezidanto (s. d.) estis terenfaligita kaj piedbatita. La venontan jaron 1924 pro minacoj de tiuj naciklubaj banditoj la registaro antaŭe interkonsentinta kun soc.-dem. partio tute malpermesis laboristan 1 majan festiron, kaj ĝi ne okazis.

Tia kompromisemeco nur ekkuraĝigis la naciklubanojn kaj antaŭ nelonge ili jam ekprovis eksplodigi la redakcion kaj presejon de "Socialdemokrats".

Tamen la pasintan dimanĉon la 15. februaro ĉ. j. tiuj banditoj kronis jam sian nacikulturan laboron per multe pli abomena faraĵo. En ĉi-tiu tago la soc.-demokratia partio mobilizis la anojn de l'laborista sportklubo por agitado per disdonado de alvokoj kaj flugfolioj okaze de balotoj al urba konsilantaro (municipalo), okazonta la 28. februaro. La naciklubbandanoj samagis. La tutan tagon sportuloj estis primokataj kaj ofendataj diversloke. Kaj jen je la 5 h. posttagmeze venas granda faŝistaro kaj atakas la sportulojn. Okazas interbatiĝo. Sportuloj sin defendas ĉiu laŭpove. Subite ektondras pafo kaj juna tute senkulpa 19 jaraĝa sportulo k-do Aleksandro Masak mortfalas, trafita de l'rabista kuglo. Karakterize estas, ke la venontan tagon la gazetaro kaj precipe la faŝista organo "Latvijas Sargs" (Latvia gardisto) grandlitere informis la legantaron pri unua komunista atako en Latvio. La registaro en sia eksterordinara kunsido la saman tagon tuj decidis fermi kiel "nacian klubon" tiel ankaŭ la sportulan klubon laboristan. Samtempe la registaro decidis plirapidigi ellaboron de la "leĝo pri ŝtatdefendo", la konata rimedo enkatenigi kaj tute sufoki la laboristan movadon. —

Karaj kamaradoj, kiu nun kulpas? Ni mem, ĉar ni stultigitaj kaj trompitaj de iaj niaj gvidantoj ekiris la vojon, kreskiganta kaj plifortiganta nian komunan malamikon. Kaj menciita okazaĵo estas nur konsekvenco de nia disiĝo. Ni atendas miraklon kiam la kapitalo ekkrios: "sufiĉas spekulacio, sufiĉas rabado, ni ekiru la vojon al socialismo!" Ne, kamaradoj, estas trompo de ti-kiuj predikaĉas tiun absurdaĵon. Same utopia estas la kredo de iuj: "per demokratio al socialismo". Vi vidas la mizeron kaj suferon de viaj fratoj en multaj landoj, vi vidas, ke la kapitalo tutmonda pretiĝas jam sufoki vin por ĉiam, kial do vi ne respondos per unuiĝo de viaj fortoj por finvenko? Ĉu vi volas, ke ankaŭ viaj infanoj suferu? Vivu unuiĝo! Vivu la vera socialismo! *3684.*

Nia Partlernejo

(Novograd-Volinsk, Ukrainio)

En Sovetio ekzistas specialaj lernejoj por preparadi funkciantojn sur diversaj ŝtupoj de l' soveta kaj partia laboro, kiuj povus aliri al ĉiu fenomeno de l' vivo kun tranĉilo de l' marksisma analizo kaj ne sin perdi en la komplikata diverseco de nia nuna socikonstruado. Ĉi-lernejoj estas nomitaj Sovetaj-Partiaj, aŭ Sov. Part. Lernejoj, kaj estas prezentataj per du ŝtupoj: unua (suba, kun unujara kurso) kaj dua (supera, kun dujara kurso). Ĝenerale ĉiu gubernio havas unu Gub. Sov. Part. Lernejon de II. ŝtupo en gubcentro, kaj kelkajn lernejojn de I. ŝtupo en periferio. Sed nia Volinja gubernio (Volinj) havas ĉi-jare nur po unu de ambaŭ ŝtupoj. En Ĵitomiro (gubernia centro) sin trovas supera Sov. Part. Lernejo, kaj ĉi-tie, en Novograd-Volinsk (aŭ, ukraine, Zvjahel) — nia unika S. P. Lernejo de l' I. ŝtupo. 110 gekursanoj, precipe en aĝo de 20—25 jaroj, ekskluzive laboristoj aŭ plej malriĉaj kamparanoj, kunvenis de l' tuta gubernio en nian urbeton por meti fundamenton al sia teknika kaj politika klerigado. Multaj el ili per propraj manoj — sur barikadoj, sub la standardoj de l' Ruĝa Armeo, almilitis la rajton vivi, lerni kaj labori por si kaj siaj kamaradoj; la aliaj (pli junaj) ne flaris ankoraŭ pulvon, sed ĉies manoj estas kutimigitaj al laboro — jen en fabrikoj, jen en kamparaj komunumoj, jen en propraj aŭ fremdaj mastrumoj. Nun ĉirkaŭe 10 "lektoroj" (politikaj fakoj) kaj "instruistoj" (ĝeneralinstruaj fakoj) helpas ilin ĉiujn akiradi la sciencon, — kaj la pedagogoj mem estas preskaŭ ĉiuj idoj de l' fizika laboro, parte kun signifa revolucia prepariĝo.

En daŭro de 9 monatoj de l' instruado (kiuj estas dividitaj en 3 trimestrojn[1]) niaj gekursanoj devas prilabori jenajn kursojn:

a) ĝeneralajn

1. matematiko; 2. ukraina lingvo; 3. rusa lingvo; 4. naturscienco.

b) specialajn

5. ekonomigeografio; 6. historio de revoluciaj movadoj kaj de socialismo; 7. historio de RKP; 8. historio de Kominterno; 9. historio de leninismo; 10. politika ekonomio; 11. ekonomia politiko (NEP); 12. soveta konstitucio.

Ĉi-tiun ŝarĝon ni devas konfesi signifan, atentante ankoraŭ nesufiĉan antaŭpreparon de nia "laborantaro" (gekursanoj) — ĉar pri l' "aŭskultantaro" ni nun jam ne parolas. La metodo de nia laboro estas ekskluzive laboreja (pardonu la taŭtologion[1]) — la gekursanoj mem tralegas la montritan materialon, priparolas ĝin, cerbe resumas kaj skribe respondas la starigitajn demandojn, kiuj elĉerpas la temon. Kun la komenco de l' dua trimestro (t. e., ĵus nun) la lernejo akceptas la Dalton-planon[2]).

Krom tio, la lerneja plano antaŭsupozas la klublaboron. La lasta fine trovis ĉe ni tre interesan formon de t. n. "kultĉefeco je l' kamparo", — nome, en la klubrondetoj — en ĉiu laŭ specialeco — iras la antaŭpreparado, raportado kaj kritikado de diversaj flankoj de l' tuto, laborita de niaj gekursanoj dum iliaj vizitoj en la "subĉefajn" vilaĝojn. Ĉi-ilia laboro estas tre diversforma, koncernante ĉiujn flankojn kaj demandojn de l' kampara vivo.

Bezone estas ankoraŭ rimarki, ke gekursanoj mem servas sin (teknika etato de l' Lernejo ne tute sufiĉas): ĉiuj estas devigataj per siaj fortoj konservi ordon kaj purecon en la internejo, kaj deĵorantoj, krom tio, helpas la kuiriston, segas kaj fendas lignon, alveturigas akvon, draŝas grenon kaj plenumas aliajn mastrumajn laborojn en lerneja agrobazo. Ankaŭ la gvidado de l' laborejaj bibliotekoj, helpo al la pedagogaro en la ekipado de l' laborejoj kaj konservado en ili de ordo kaj pureco — kuŝiĝas sur la kursanaron.

Al tio aldoniĝas ankoraŭ kelkaj materialaj malfacilaĵoj, kunligitaj kun la mizera budĝeto de Sovetio: manko de aparatoj, reaktivoj, parte — de libroj, maldiverseco de l' nutrado.

Sed ĉiuj ĉi malfacilaĵoj ne malvarmigas la junajn ge"part"lernejanojn, kiuj komprenas, ke ilia heroa tasko — konstruado de "nia regno" — postulas ankaŭ heroajn streĉojn. Ili restas viglaj, ĉiam kun juneca ŝercaĵo aŭ gaja kanto inter lipoj. Kaj kunveturante nun (post la dusemajnaj ferioj) en "sian" Lernejon, ĉiuj unuanime rakontas pri sia tedo en malproksimeco de l' "parenca" kolektivo.

Do ĉi-energio almilitos, kion ĝi volas!

Gek-doj, interesiĝantaj pri iaj detaloj, estas petataj sin turni al la aŭtoro (la adreso en ĉi-numero, fako "Korespondado"). *G. Filippov.*

1) tri kvaronjaroj.

Suprenirante de kaŭzo al kaŭzo, sin turnante ĉiam pli alten, la rigardo de la homo finfine tiel nebuliĝis, ke ĝi absolute nenion plu diferencigis. En tiu ĉi jen nebulo la homo lokis sian diaĵon. Golbaĥ, "*Sistemo de la naturo*".

1) samvorteco.
2) nova lernmetodo.

“Labkoroj“ en Sovet-Unio

Antaŭnelonga burĝa ĵurnalo . . . Mensogo, korupto, vendemo . . . grupeto de specialistoj kun elmanĝitaj animoj plenumas la aferon. Tiel estis en Rusio antaŭ la revolucio.

Post la revolucio. Gazetaron posedas laborista klaso. Varmegaj koroj, sed nesperteco. Batiga veriva parolo, sed malforteco de informo. Nescipovo eniĝi amasojn, — tio-ĉi estas, — nescipovo reflekti amasojn.

Sed post la heroaj jaroj de la civitana milito venas la tempo de rikolto. Ĉie atmosfero de intensa laboro. Ĵurnaloj eniĝis en gravaj malgravaĵoj de la klopodema formikujo.

Kaj ĉie-tie iel nerimarkite, neatendite ekaperis la plej aktuala en la vivo de nuna Sovet-Unio vorto “labkoro“ — *lab*orista *kor*espondanto.

Labkoro estas “unua specimeno de nova ĵurnalisto, komenca ŝtupo de tia nova ŝtuparo, sur kiu leviĝas soveta gazetaro. Labkoroj estas “juna kaj nekonata gento“ en historio de laborista gazetaro. La nova, precipe freŝa tavolo de soveta socistato“.

“Labkoro, esprimante opinion de laboristoj, estas intime kunligita kun fabrikeja vivo kaj estas sub kontrolo de laborista amaso. Labkoro, kunligante laboristaron kun ĵurnalo, sin prezentas en la sama tempo organizanto de l’kontrolo de la vivo de entreprenejo.“ En tiuj esprimoj difinas la signifon de labkoreco iu laborista gazeto.

En siaj korespondaĵoj labkoro malkovras vivmanieron kaj moraron de fabrikentreprenejo kaj laborista amaso. La nova tempo renversis la malnovan malvivaĵon de ĉiutaga vivordo: malnovajn rilatojn de organizado de laboro, burokratismon, familian sklavecon, religiecon, ebriecon . . . Renversis, sed ne mortigis: vice kun eroj de novaj rilatoj kaj vivmaniero ankoraŭ vivas maljunega senkultureco kun ĉiuj siaj akompanantoj. Labkoro — nesilentiga reprezentanto de *la* nova soveta socistato — senkompate elportas por juĝo de socio ĉiujn ulcerojn de ĉiutaga vivo kaj laboro.

Labkoraro en lukto pro nova socio akiris en Sovet-Unio en mallonga tempo tian signifon, ke nuntempe, ne estas eĉ imagebla ekzistado de iu ĵurnalo sen larĝa disĵetita, traiganta ĉiujn porojn de l’regiono, priservata de la ĵurnalo, kolektivo de labkoroj.

Nun koncepto de labkoro jam tre diferenciĝis laŭ speciala deklino de ilia laboro: ekzistas propre labkoroj (laboristoj de stablo), vilaĝkoroj, sindkoroj (de sindikatoj), militkoroj, kultkoroj (de kultureca laboro) kaj eĉ pikoroj (de pioniroj — organizaĵo de laboristaj geknaboj).

Nuntempe en USSR oni kalkulas ĝis 100 miloj da labkoroj.

Laboro de labkoroj trapasas en treege nefavora cirkonstancaro. Dum sia malnfektiga laboro labkoro trairas en ĉiuspecaj mallumaj anguloj de vivo, senvualigas ŝteladon, burokratismon, koruptecon, eluzadon de malklereco de amasoj ktp. En multaj okazoj labkoresto estas kunligata kun konstanta minaco por la vivo. Kaj nuntempe labkoraro nombras jam grandan kvanton da viktimoj.

Tiel efikas la brikaro de la nova sociordo. *A. Tomo, Ĥarkov, (3712)*

Ni evitu mispaŝojn

Baldaŭ aperos franclingve verketo de K-do Lanty pri la mondlingva demando. Mi opinias, ke interesos la legantaron de Sennaciulo *jam ekkoni la konkludojn al kiuj alvenis la verkinto, post tute objektiva esploro de la nuna stato de l’afero.*

Eble pli poste ni publikigos la tradukon de kelkaj partoj de tiu tre koninda studaĵo. *L. B.*

“. . . Certe esperanto ne plu estas nun projekto de lingvo kiel ĉiuj ĝiaj konkurantoj. Tial la penoj de ĉi-lastaj estas tutcerte fiaskontaj. La laboristaj organizaĵoj kiuj decidos utiligi praktike unu lingvon internacian povos alpreni *nur* esperanton. Ĉiu alia decido restus nur surpapera senvivaĵo. Ne sufiĉas ja *decidi* pri alpreno de iu internacia lingvo. Necesas unue, ke ĝi povu esti lernata en ĉiuj landoj de l’mondo. *Sole* esperanto plenumas tiun postulaĵon; tial ke *sole* ĝi atingis sufiĉan disvastiĝon, ebligantan trovi en ĉiuj landoj personojn, kiuj kapablas ĝin instrui; tial ke *sole* en esperanto ekzistas en ĉiuj lingvoj lernolibroj kaj vortaroj, kiuj ebligas lerni kaj praktikadi la lingvon; tial ke *sole* esperanto posedas literaturon sufiĉe vastan por ebligi, per legado de bonaj verkoj, akiri la stilon necesan por korekta kaj eleganta esprimo de l’penso.

— — — — — — — — — — — —

Kiu ajn objektive ekzamenis la nunan staton de la mondlingva movado estas devigata konkludi, ke esperanto estas vivanta lingvo. Povas do *nur* temi pri akcelado de ĝia disvastiĝo por atingi la *faktan* solvon de l’problemo pri interkompreniĝo inter ĉiuj popoloj . . .“

La anglaj fervojaj kompanioj postulas salajrajn plimalaltigojn

(I. T. F.) La anglaj fervojaj kompanioj respondis al la programo de la fervojista unio kaj la asocio de fervojaj oficistoj per kontraŭprogramo, kiu planas meze plimalaltigon de la salajroj je 4 ŝil. kaj kelkokaze eĉ je 6 ŝil. posemajne. La pli granda malfavoriĝo rilatas precipe la dungitojn de l’ vilaĝanaj distriktoj. Ĉiuj postuloj de la du dungit-organizaĵoj rilate al pensioj, plimallongigoj de labortempo ktp. estas rekte rifuzataj. La fervojaj kompanioj motivas tiujn ĉi kontraŭpostulojn per la konstato, ke la fervojistaj salajroj kontraŭ 1914 pli multe altiĝis ol tiuj de la ceteraj industriaj grupoj, je kio oni intence malatentas ke la fervojistaj salajroj antaŭmilitaj staris sub la ĝenerala nivelo. La sinteno de la fervojaj kompanioj elvokis en Britio grandan maltrankviliĝon. Prave la sekretario de l’ fervojista unio, C. T. Cramp, atentigas ke la fervojaj kompanioj per la nova grupiĝo kaj asociiĝo kapablas fari grandskalajn ŝparojn helpe de la normaligo kaj pliperfektigo de l’fervoja instalaĵo. Laŭ la kalkuloj de la kompanioj la efektivigo de iliaj kontraŭpostuloj signifus malaltigon de la kostoj salajraj je sumo de 5000000 £, dum la efektivigo de l’fervojista programo rezultigus ĉiujaran plialtigon de 45000000 £. La postulon, pli detale dokumenti ĉi-kalkulon, la kompanioj ĝis nun ne plenumis. Cetere per la kontraŭprogramo de la kompanioj ankaŭ la lokomotivistoj estas implikataj en la konflikton.

Statistika bildo pri Hungario

La multekosteco kaj la senvaloriĝo de l’hungara krono estis tute kunligitaj, sed pli poste la multekosteco sendependiĝis sin de la eksterlanda kurzvaloro de krono, kaj nun la multekosteco vivas sian apartan vivon. Ekzemple:

	La svisa franko pliiĝis en procentoj	La vivebleco pliiĝis en proc.
ĝis 1. jan. 1923:	107,4 proc.	114,4 proc.
ĝis 31. dec. 1923:	713,0 proc.	1960,0 proc.

La senvaloriĝo de l’hungara krono kompare al svisa franko permesus nur 7 oblan pliiĝon de vivebleco, sed kontraŭ ĉi tiu la multekosteco en realo estis 20 obla.

La plej necesaj kaj plej primitivaj artikloj jam de longe postlasis siajn pactempajn valorigitajn — tielnomatajn “orajn valorojn“. La tritiko je 22,7 proc., la maizo je 68,8 proc., la terpomoj je 43 proc., la tritikfaruno je 40 proc., la sukero je 48 proc., la graso je 61 proc., la porkviando je 60 proc. estis pli multekostaj ol en la lastjaro de pactempo.

Kontraŭe la salajro de el sia panakira laboro vivantaj personoj apenaŭ atingas 50 proc. de pactempa salajro, kaj se ni taksas la aĉeteblecon de paca krono nur je 25 proc., tiam la salajruloj povas aĉeti nur tiom per sia salajro, kiom ili povis aĉeti por 37 proc. de sia pactempa salajro.

Laŭ la statistika oficejo en 1922, kiam en la dispecigita Hungario la nombro de industri-kolonioj estis pli je 500 ol en 1913, la fabrikoj pagis por siaj dungatoj 90,6 milionojn da orkronoj, ĝis dum la lasta jaro de pactempo (1913) ili pagis 774,6 milionojn da orkronoj. Do en 1913 por unu laboristo oni pagis posemajne meze 24,8 orajn kronojn kaj en 1923 nur 7,74 orkronojn. De tiam ĉi proporcio je la malprofito de laboristoj plimalboniĝis. *Adalb. Schuller.*

DISKUTEJO

Ĉu kristana etiko?

Mi dubegas, ĉu plimulto de tiuj, kiuj nomas sin kristanoj, aŭ opinias esti tiaj, efektive estas kristanoj. Pasis jam preskaŭ dumil jaroj de post tiu tempo, kiam Jesuo Kristo parolis siajn instruojn al homoj. Multo de tiu tempo ŝanĝiĝis: la scienco faris egan paŝon antaŭen kaj neis ĉiujn konvinkojn, preskaŭ ĝis 18. jarcento alkalkulitajn al aferoj nekritikeblaj.

La "sanktaj libroj" klare parolis al ni kaj ankoraŭ parolas pri sestaga kreo de l'mondo, pri meza situo de nia terglobo, pri supereco de l'ĉielo, pri signifo de steloj kaj iliaj direktantoj, kaj nun iom post iom la scienco ĉion ĉi neas. Ĝi pruvis, ke la mondo ne estis kreita dum ses teraj tagoj, sed ke daŭris iomete pli longe, ke la terglobo ne situas meze de l'universo. Ĝi pruvis per ekzaktaj elkalkuloj, ke sunsistemo estas nur eta parto de sistemoj de aliaj sunoj. Kaj kio estas nia terglobo? El loko por diaj eksperimentoj ĝi ŝanĝiĝis je polvero, turniĝanta en la universa spaco. Do ne ĉielo kun planedoj turniĝas ĉirkaŭ ĝi, sed kontraŭe. La ĉielo, kiu ĝis nun ludis plej gravan rolon kaj estis loĝejo de dio, laŭ pruvo de scienculoj estas fikcio, tute ne ekzistas, kaj tio, kion ni kredas firmamento, estas nur iluzio, efiko de l' aera optiko. La infero por ĉiam perdis sian ejon en la terprofundo kaj Darvin donis al ni: *Origin of species by means of natural selection*", kiu detruis por ĉiam legendon pri mirakla formigo de la homo el argilo.

Ni ĉiuj jam estas konatigitaj kun tiu ĉi elementa sciaĵo kaj akceptas jam kiel fakto. Koncerne teorion de Darvin ni povas nur diri, ke se eĉ ĝin anstataŭos ia ajn alia, tamen pro momenta akordiĝo kun lia teorio jam aperas duboj koncerne verecon de malnovaj sciencoj kaj tio sufiĉas por ke ni detruu la tutan fizikkonstruaĵon, sur kiu apogis sin la scienco, kiu estas kontakte kun religio.

Kion do ni povas diri koncerne etikon de l'kristanismo? La evangelioj estas plenigitaj per kontraŭdiroj. Sed ni prenu la plej decajn al dio paragrafojn de l'etika kodekso. Ĉu efektive tie estas io dirita pri sangaj bataloj inter la homoj kaj ĉu ili laŭdas tiujn ĉi agadojn? Jen en evangelio de S. Mateo estas dirite: "Ci devas ami cian proksimulon kiel cin mem", "Vi ne devas kontraŭstari al malbono; sed se iu donas frapon sur vian dekstran vangon, al tiu prezentu ankaŭ la alian". Ŝajnas al mi, ke tiuj ĉi vortoj mallaŭdas militojn, kaj tamen niaj perantoj inter ni kaj dio kun furiozeco, efektive deca al satano, kian ni antaŭe imagis kaj ankoraŭ multaj nun imagas, gvidas tiujn aŭ tiujn ĉi batalantojn, instigante al batalo kaj benante la glavojn, kiuj post momento senkapigos iujn aliajn kristanojn, havantaj malfeliĉon naskiĝi sur alia peceto de tero. Oni devis disvastigi benitan instruon de Kristo, promesanta eternan pacon sur tero kaj ne helpis al si sen glavoj kaj kugloj. Militiston sekvis misiisto kaj inverse. La malriĉuloj (kiujn tiom amis Kristo) mortas pro malsato, sed ĉi-parazitoj vivas kiel eble plej bone dank' al mortantaj mizeruloj.

Ni laboristoj devas unu fojon por ĉiam ĉirkaŭi nin per ĉina muro kontraŭ tiuj trompuloj kaj trompaj doktrinoj. La samon oni povas diri pri aliaj religioj, sed mi tuŝis nur kristanismon pro ĝia pleja potenco kaj influo ĉe ni. Se mi forgesis ion, ĉiu konscia laboristo mem povos al si suflori.

H. Halpern, Lublin.

K-do H. H. laŭ mia opinio ne ĝuste formulas la demandon, argumentante ke "plimulto de" kristanoj nuntempaj ne jam estas veraj kristanoj. La demando devas esti, ĉu entute kristanismo estas unuigebla kun marksismo en la nunaj historiaj kondiĉoj, kaj je tiu demando oni libere devas respondi per "ne", tute ne konsiderante la historian rolon, kiun ludis la kristanismo depost sia fondiĝo. Marksano simple konstatos, ke en nia epoko al kristanismo mankas ĉiu historia ekzistrajto. Plene superfluas do la esploro, ĉu tiu aŭ alia persono estas trompulo aŭ "vera kristano".

Ni atentigas, ke ni nur escepte donis spacon por tiaj temoj en "S." kaj antaŭanoncas por interesuloj (kiuj ne jam abonas S. R.), ke la aprila kajero de "*Sennacieca Revuo*" estos dediĉita speciale al ateismo.

N. B.

Pensoj

En statuto de SAT estas dirite: "a) utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda". Kion oni komprenu per "klasaj celoj"? Tio estas elasta, vastigebla koncepto. "Klasa" signifas "unueca, devenanta el aro de sampensantaj, samagantaj homoj". Oni do komprenus sub "klasaj celoj" la celojn de homaro sampensanta kaj samaganta. Sed kiaj estas tiuj „klasaj celoj" alcelataj de ni? Do la proletaraj, kiujn — konkrete parolate — la laboristaro kiel klaso deziras efektivigi! Ni do venas de la celoj al la taskoj, al la praktika reala efektivigo.

Kiom vaste oni devas meti la limojn por tiu praktika agado por realigo de la "klasaj celoj", kaj kie ni komencu?

Ni, kiel laboristoj kaj SAT-anoj, nur povas kompreni je "klasaj celoj de tutmonda laboristaro" tiujn batalojn de laboristaro por plibonigado de la laboristaj vivkondiĉoj kompare al tiuj de la bonstatuloj. Do, ni interesiĝas speciale pri aferoj, problemoj, taskoj rilatantaj niajn ekonomiajn kondiĉojn.

Du ĉefaj problemoj distingiĝas: Labortempo kaj salajro.

Do nin interesas scii, kiaj laborkondiĉoj regas en ĉiu ajn lando rilate al labortempo kaj salajro. Sekve de tiuj komunikadoj de spertoj ni povas fari niajn konkludojn, serĉi la rimedojn, por malpliigi la nivelon de nia labortempo je la atingebla minimumo, koncentrigi la spertojn prilabortempajn de ĉiuj SAT-anoj estas unu el niaj taskoj.

La dua estas kolekti la spertojn pri la salajra demando. Justa rekompenco de laboro ("salajro" en kadro de kapitalista socio) solvus la problemon "mizero".

Do, tiel ŝajnas al mi, ni devas kompreni la statutan paragrafon "utiligi praktike la intern. lingvon Esperanto por la klasaj celoj de la lab-istaro tutmonda". *1804.*

SAT-anoj!

Jen propono okaze de 1. majo. Per niaj lingvo kaj korespondado ni helpu al la gek-doj, kiuj ne scipovas esp-on. Pro tio ĉiu SAT-rondo sendu PK aŭ leteron al aliaj SAT-rondoj en la eksterlandon kun bondeziroj okaze de 1. de majo. Poste oni traduku la enhavon nacilingven kaj legu laŭtvoĉe ĝin dum la festo inter la laboristaro. Kiu konsentas? Mi opinias, ke tio estus bona propagando por esp. kaj SAT. 1851.

DIVERSAĴOJ

Kardinalo, pastro kaj rabeno unuiĝas por enkonduki religion en la lernejo

Nju Jork, 4. febr. 1925. Kun la scio, ke la religio estas efektive la opio de la popolo kaj tenos masojn subigataj al aŭtoritato kaj lojalaj al venĝema dio, aperis en kunveno en hotelo Valdorf-Astoria kardinalo Hez (Hayes) kune kun protestanta pastro kaj hebrea rabeno por nutri movadon kun la celo doni almenaŭ unuhoran instruon religian al la infanoj de publikaj lernejoj ĉiutage.

Ĉeestis ĉirkaŭ 2500 lernejaj geinstruistoj, preskaŭ ĉiuj katolikoj. La okazo estis tiu de jarkunveno de asocio de katolikaj instruistoj.

La parolantoj deklaris, ke pro la krimondo ekzistas ĝenerala postulo de instruado al la lernejinfanoj, ke ili havas animon kaj ke ili estas respondaj pri siaj agoj.

Pastro Alter M. Haŭlet (Howlett), sekretario por religia edukado de la Novjorka Federacio de Preĝejoj, faris la deklaracion, ke ekzistas kondukantaro en la Eduka Konsilantaro, kaj "ili deziras tiun ĉi sisteman labortagan religian instruadon por la infanoj tiel serioze kiel ni."

La respektata (angle "Reverend" respektinda (-enda), ĝenerala titolo de pastroj) doktoro diris, ke nur 400000 infanoj en Nju Jork ricevas religian instruon kaj ke 800000 estas sen ĝi.

Kardinalo Hez iam diris: "Anstataŭ esti antagonista al publika instruado, kio estas la rajto kaj devo de la ŝtato, la katolika eklezio simpatias kun ĝi."

Poste en la sama elspiro li diris: "Ĉio, kion ni postulas, estas, ke la ŝtato vidu klare, ke publika edukado malsukcesos, se ĝi ne enportas en la animon de la infano ĝustan ideon pri ĝia rilato kaj devo al la religio."

La maŝiavela[1]) kardinalo estos simpatia kun la ŝtato, se ĝi konsentas kun lia opinio pri la religio kiel la opio de la popolo.

Rabeno David De Sola Pul (Pool) por la judoj (hebreoj) diris, ke la kristanoj kaj judoj estas egalaj en tiu ĉi "sankta devo", kiel li nomis ĝin.

(El "The Daily Worker" (Chicago) trad. Karl Fröding).
5. febr. 1925.

La aŭtomobila cirkulado en Usono

Fine 1924, la nombro, oficiale kontrolita, de la motorveturiloj cirkulantaj en Usono sumis: 17879924, el kio: turismaj aŭtomobiloj 15597628, ŝarĝaŭtom. 2142608, motorcikloj 139688.

Fine 1923, la tuta nombro estis 15312638, do pliiĝo da 2567286, el kio 2000000 por la turismaj aŭtom.

Konsiderante la loĝantnombron en Usono: 114 milionoj, do ekzistas 1 motorveturilo po 6,42 homoj, aŭ 1 turisma aŭtomobilo po 7 homoj.

RECENZEJO

Gazetoj

Represis artikolojn el S.: Basler Arb.-Zeitung, Basel, 20. 2., Travivaĵoj en Budapest (S. 17), Ny Tid, Chicago, 17. jan., Prol. verkistoj (S. 11), Berg. Volksstimme, Remscheid, 3. febr. kaj Freiheit, Düsseldorf, 25. febr., Lunaĉarski k. esp. (S. 18).

I.T.F.-bulteno de febr. enhavas esp. informojn.

1) Machiavelli — itala politikisto, ruza diplomato.

Promenoj kaj promenetoj sur marĝenoj de esperantaj gazetoj

18. Dolaro kaj Biblio el Ameriko aŭ komunismo plus elektrifiko

En la romano de E. Erenburg "Julio Jurenito" (vidu fragmenton en "Lit.-Sc. Aldono de Senn. Revuo" n-o 1 — 1923), pentranta en karikatura formo karakterizaĵojn de la moderna kapitalista mondo kaj tre multelegata nun en Rusio, — inter diversaj figuroj de la romano estas prezentata kiel tipo amerikano s-ro Cool, kies devizo en ĉiuj liaj aferoj kaj entreprenoj estas — "Dolaro kaj Biblio"! Per nure tiuj ĉi du vortoj la aŭtoro mirinde sukcesis trafi la tutan esencon de la moderna grandkapitalistaro, kiu intime adaptas la kristanan eklezion por servado al la vera dio — mono.

Ĝis kia grado estas prava tiu ĉi trafa esprimaĵo, ni havis plezuron konvinkiĝi per Esperanto. Aperas en Ĉikago pure komerca, negoca esp. gazeto "Export Esperantist" kaj — kio estas la plej pikanta — regule, numeron post numero, sur sia fruntopaĝo ĝi metas — kvinpintan stelon kun desegnita sur ĝi signo de dolaro ($) kaj apude tekstojn el la Sankta Skribo!!! Bela idilio de komercismo kaj religio!

Ni ĉerpas hodiaŭ el "Exp. Esp-ist" (n-o 6) jenan fragmenton, kie la gazeto rezonas: "Ĉu komunismo estas nepraktikebla?" Ĉar la temo estas ne pri la politika, sed pri la ideala, teoria komunismo, ni kuraĝas tie ĉi repliki. El bedaŭrinde tre malklara kaj malfacile komprenebla stilo de tiu ĉi artikolo montriĝas, ke komunismo por enspiri "senpagan aeron" kaj tiu por la privata apartenaĵo estas granda diferenco. Kaj eĉ evidentiĝas ankaŭ:

> ... ke aero en ĉiuj formoj kaj ĉiame, ne estas necese senpaga. La regiono okupata de la aero fariĝis la sceno de propraĵa senco, kun la alveno de radio.

Do — ĉio estas pagenda, paginda kaj pagota! Kiel hotelisto en la romano de V. Hugo "La mizeruloj" oni povas diri, ke la hotela gasto devas pagi ankaŭ por la muŝoj, kiujn glutas lia hundo, — diablo prenu!

Tamen ekzistas solrimedo:

> ... limigata komunismo, kiu povas esti inda, povus elveni de universala malkareco de produktaĵo ... Aliavorte, la sola praktiva vojo al ia speco de komunismo estas per intensiva disvolvigo de kapitalismo.

Rimarkinda logiko: por atingi celon — faru rekte kontraŭaĵon, malaĵon. Kaj ni ne bezonas pruvi tie ĉi, ke universala malkarigo de la produktaĵoj *ne* estas en la interesoj de la kapitalistoj kaj ke estas ĝuste kontraŭe: — malkarigo de la produktaĵoj estas atingebla nur per malpliigo de la salajro kaj mizerigo de la laboristaro unuflanke kaj aliflanke, industriaj krizoj okazas plejparte nome pro troproduktado kaj malgraŭ tiu troabundeco kaj sekva malkareco — neaĉeteblo de la fabrikaĵoj. Ni vidis tian bildon ekzemple en Germanio 1923: por eksterlandulo ĉio estis ridinde malkara, sed enlandulo apenaŭ kapablis ion aĉeti.

Ni scias feliĉe alian, pli efektan rimedon kaj por ĝi ni batalas ĉiuforte: komunigo (nacionalizo) de ĉiuj kapitaloj kaj produktiloj, kaj nur tiel — per transdoni ilin el la manoj de l' parazitoj al la kalozaj manoj de la produktantoj mem — oni povas realigi la komunismon, respektive la veran socialismon.

Estas domaĝe ankaŭ, ke en la kritikata artikolo estas fuŝuzita la nomo de la fama, antaŭnelonge mortinta scienculo Steinmetz, kiu korespondis kun Lenin pri signifo de grandioza tutlanda elektrifiko en Sovetio. Ni forte dubas, ĉu "senpaga elektro" efektivigos komunismon aŭ komunismo efektivigos senpagan elektron?

Fama estas diraĵo de Lenin: "Komunismo estas sovetsistemo plus elektrifiko". Sed kapitalismo plus elektrifiko restos la sama kapitalismo sen iu diferenco, sen iu distingo.

Moskvulo.

KRONIKO

Aŭstrio

La 1. kaj 2. februaro en Leoben (Stirio) okazis la jara plenkunveno de la aŭstria liberpensula ligo. La plenkunveno unuanime akceptis jenajn du proponojn:

Esperanto estas akceptata en la celaro de la aŭstria liberpensula ligo.

La aŭstria liberpensula ligo estos oficiale reprezentata ĉe la Va SAT-kongreso en Wien.

Leobersdorf. La 12. febr. la partoprenintoj de kurso, gvidita de k-dino Steffi Müller, Wien, fondis lab. grupon, kvankam la cirkonstancoj en nia regiono kaj urbo estas ege teruraj pro la senlaboreco. La duono de la grupanoj estas senlabora. Ni petas la ĉiulandajn gek-dojn kaj lab. grupojn, subteni nian junan grupon per sendo de nebezonataj E.-libroj, gazetoj ktp., por havigi al la membroj ekzercmaterialon. Sendaĵoj kaj korespondaĵoj estu direktataj al: K-do L. Tabaka, Enzesfeld 23, N.-Oe., Aŭstrio.

Estonio

Tallinn. Fonda kunveno de esp. fako ĉe Tallina Presista Unuiĝo okazis 20. febr. Partoprenis proks. 30 p., kiuj aliĝis al la esp. fako. Estas aranĝota esp. kurso por presistoj. Gvidas k-do J. Temmer. Kunvenoj okazas ĉiuĵaŭde en la societejo, *Rüütlitän 15.*

Centra komitato de "Turista Asocio la Naturamikoj" por Esperanto

En la distrikta organo por Saksio de ĉi-supra organizaĵo estas publikigita jena komuniko.

Esperanto - Sekcioj. La Centra Komitato bonvenigas la starigon de esp.-sekcioj. Ĝi opinias, ke tiaj klopodoj estu kiom eble subtenataj. Sed la fondado de esp.-sekcioj restas afero de l' lokaj grupoj mem. La esp.-sekcio estu nur ero de l' loka grupo kaj tial ĉiuj agoj devas esti konsentataj de ĝia estraro. Membroj de l' esp.-sekcioj devas aparteni al "Turista Asocio La Naturamikoj."

Antaŭ nelonga tempo ĉi Centra Komitato malfavoris esp-on. La ŝanĝo de ĝia vidpunkto estas rezultinta el la energia propagando de tiuj k-doj, kiuj estas anoj de koncerna Turista Asocio Proletara.

La sekcio Dresden de post kelkaj semajnoj gvidas kurson, kiu estas vizitata de 28 gek-doj.

Por povi pli forte pravigi nian poresp-an agadon, ni ripetfoje apelacias al la gek-doj per la peto, sendi materialon, pruvanta pozitive la utilecon de esp-o por la internaciigo de potenca turista movado laborista.

Por la sekcio Dresden
Erich Meyer, Dresden-A. 28
Bünau-Str. 54 p. (Germanio.)

PROTOKOLO

de la kunsido intertrakta inter idistoj kaj esperantistoj komunistaj

Ĉeestas kamaradoj Marget, Milter, Revo, Drezen, Jodko, Guihéneuf kaj Nekrasov.

Prezidantoj: Marget, Revo;

Sekretarioj: Milter, Drezen.

Proponoj

1) Oni publikigu en la gazetoj nenion krom la oficialaj informoj kaj protokoloj reciproke subskribitaj.

2) Pri la adreso komuna al la Ekzekutiva Komitato de Komintern.

3) Pri la okazo, se K. I. rifuzas elekti L. I.

4) Pri la agoj ĉe K. I. se ĝi pridiskutos la problemon.

5) Pri la diferenco de esperanto kaj ido.

6) Pri la agoj, se K. I. rifuzas aŭ prokrastas solvi la problemon.

7) Pri la anstataŭantoj de k-doj Marget kaj Revo.

8) Pri la starigo de speciala observa komisiono.

9) Pri la pasinta laboro de esperantistoj kaj idistoj komunistaj.

Decidoj

1) Akceptita.

2) Reprezentantoj de esperantistoj kaj idistoj komunistaj, sincere konfesante, ke la realigo finfina de la L. I. ne estas ebla sen interveno de E. K. de la K. I., decidas sendi al E. K. K. I. delegacion el k-doj Revo kaj Marget por prezenti la proponojn pri la elekto kaj enkonduko de L. I. por uzo de K. I.

3) En la okazo, se K. I. rifuzas elekti kaj enkonduki L. I. por sia uzo, la delegitoj faras proponojn pri praktika utiligo de la L. I. por la bono de la komunista movado.

4) Kiel reprezentantoj de la L. I.-movado konsideri ekskluzive k-dojn Marget kaj Revo, kaj nur per ili liveri al K. I. ĉiujn informojn, dokumentojn ktp.

Ĉiuj dokumentoj de esperantistoj kaj idistoj povas esti prezentataj al K. I. ĉe reciproka kaj komuna subskribo de ambaŭ reprezentantoj. Tiuj du kamaradoj gvidas kaj direktas la propagandon ĝeneralan de L. I. inter komunistoj kaj zorgas pri forigo de konfliktoj kaj atakoj reciprokaj.

5) La ĉeestantoj konstatas ke dum la tuta reciproka interparolado oni komprenis tute facile esperanton kaj idon. Diferenco estis pli malgranda ol la diferenco inter la dialektoj Marseill-a kaj Pariza, Viena kaj Berlina.

6) Se K. I. rifuzas aŭ prokrastas solvi la problemon, la tasko de idistoj kaj de esperantistoj komunistaj estas apliki kaj uzi siajn lingvojn por la intereso de la internacia laboristaro kaj komunistaro.

La tuta agado devas celi ĉefe praktikan aplikon. Ĉiu komunisto esperantista kaj idista povas kaj devas apliki sian lingvon por certaj celoj revoluciaj.

Esperantistoj kaj idistoj devas reciproke ne malhelpi al la agado de revolucianoj mondlingvanoj.

En ĉiuj societoj kaj organizaĵoj revoluciaj, kie estas aplikata unu lingvo, oni ne devas ĝeni paralelan uzon de la alia. Observi kaj gvidi tiun laboron, oni komisias al kamaradoj Marget kaj Revo, kiuj konforme al la 4. punkto zorgas pri forigo de konfliktoj kaj de atakoj reciprokaj.

7) Elekti kiel plenrajtajn anstataŭantojn: por k-do Marget — k-don Milter aŭ alian por k-do Revo — k-don Drezen aŭ k don Jodko.

8) Se K. I. trovos necese observi kaj kontroli la movadon internacilingvan — rekomendi al K. I. kreon de speciala observa komisiono, kiu krome povus ellaboradi la vojon de plena unuigo de I. L.-movado kaj trovi rimedon por ĝia akcepto de K. I.

9) Konstati ke en pasinto estis multaj mispaŝoj kaj eraroj. Zorgi ke estonte la laboro daŭriĝu amike kaj kontakte inter ambaŭ mondlingvaj tendencoj komunistaj.

Moskvo, 30. januaro 1925.

Subskriboj: *E. Drezen, R. Guihéneuf, A. Jodko, R. Marget, F. Milter, N. Nekrasov, L. Revo.*

La Rezultoj de la intertraktado de komunistaj esperantistoj kaj idistoj de vidpunkto esperantista

La vastan publikon ĉiam fortimigas la scio, ke ekzistas du konkurantaj sistemoj de lingvo internacia; kaj niaj "mifrati" malgraŭ sia malmultnombreco ja ĉiam tre bone sciis zorgi pri la diskonigo de tiu fakto.

La komunistaj esp-istoj speciale akre sentis neorportunecon de tiu situacio despli ĉar lastatempe la komunistoj-esp-istoj kaj idistoj estis solaj frakcioj en la komunistaro, intermilitantaj, se ne sur politika tiam sur la lingva kampo.

Tial ĉie kaj ĉiam ni komunistoj-esp-istoj klopodis pri starigo de unuecfronto sur la kampo de mondlingvanoj-internacilingvistoj. Se el tiu klopodado nenio rezultis — gravan kulpon pri tio havis la idist-esp-ista interluktado: la unuaj klopodis akiri kaj diskonigi favorajn rezoluciojn pri la lingvo-kvalitoj de ido; la aliaj — klopodis senmaskigi tiujn rezoluciojn kaj pruvi ilian senvalorecon.

Ĉiuokaze pro tiuj agoj — en la okuloj de ĉiuj rondoj pli-malpli vastaj — estis kompromitata kiel idista — tiel ankaŭ la esp-ista laboro.

Ne nur unu fojon ni esp-istoj-komunistoj klopodis prezenti al certaj institucioj la faktojn objektivajn, favorajn por nia ideo. Samtempe ni zorgis starigi pacan kunlaboron kun la idistaj kamaradoj.

Dum la kongreso en Cassel 1923 la komunista frakcio eĉ elektis specialajn rajtigitojn por pritrakti tiun temon kun la idistoj.

Ĉiuokaze estis ne kulpo de tiuj rajtigitoj se daŭre dum 1½ jaro oni atingis neniun rezultaton. Finfine la 30. januaro 25 en Moskvo pro la lasta insista propono de esp-istoj okazis kunveno de rajtigitoj de komunistaj esp-istoj kaj de la idistoj — kiu preparis la kampon por reciproka kunlaboro.

La tekston de la interkonsento, esprimitan en la rezolucioj de tiu kunveno — oni trovos aparte presitan.

Per tiu ĉi artikolo mi volas nur atentigi pri valoro de tiu interkonsento de nia esp-istkomunista vidpunkto. Mi volas nur analizi ĝiajn objektivajn sekvojn kaj rezultojn.

Atentante la gravecon de la problemo pri internacia lingvo kaj tion ke difinita enkonduko de la lingvo internacia dependos de mondaŭtoritataj organizaĵoj, povantaj subteni sian decidon per forto morala kaj materialafinanca, ni unuigite kun idistoj nin turnis al Komintern kun propono studi la problemon kaj fari difinitan decidon.

Tiu decido niaopinie ne povas esti bazata sur iuj konsideroj, krom tiuj pri utiligo de la L. I. en la tutmonda laborista klasbatala movado. Tian kaj nur tian vidpunkton povas havi veraj komunistoj kaj tian vidpunkton neeviteble havos la gvidanta Centro Komunista-Ekzekutivo de Komintern.

Se Komintern bezonus iajn informajn materialojn ktp. — la interkonsento kun k-dojidistoj garantias, ke nek unu dokumento tiurilata estu prezentata de iu aparta grupo. Pri ĉiuj dokumentoj ambaŭflankaj — ili estos signataj de rajtigitoj esp-ista kaj idista. Tiamaniere ni estos garantiataj de diversaj akcidentoj malagrablaj, kiuj povus eventuale okazi.

Tio ankaŭ garantias nin esti ĝustatempe avertitaj pri iuj projektoj, pri kreo de iuj neplenpovaj studkomisionoj, ne posedantaj la necesan moralan kaj materialan povon de la Centra Ekzekutivo, kiu sola kapablas kontentige solvi tiun mondproblemon.

La komuna sinturno de esp-istoj kaj idistoj al Komintern per si mem altiros pli grandan atenton al nia movado kaj ĝia utiligo por la celoj internaciaj.

Povas tamen okazi, ke la decido difinita estos prokrastata. Tiaokaze la esp-istoj kaj idistoj-komunistoj garantias reciproke ĉesigon de la polemikado, de la blufado ktp. Oni ĉiam memoros sian apartenon al unu komuna mondrevolucia partio. La ĉefa zorgo estos disponigi la lingvojn ekzistantajn al praktika uzo de la revolucianoj.

Tiamaniere ni neeviteble daŭrigos nian konkuradon, sed la konkurado evoluos sur tiu kampo kiu estas plej oportuna por ni kaj por la aktiva revolucia laboro — *la kampo de praktika uzo.*

La kamaradoj-esperantistoj scios bonuzi tiun fakton.

Ĝis nun ja ni ĉiam laŭeble zorgis diskuti la lingvoproblemon nur de la vidpunkto aplikanta kaj uzanta.

Skizoj pri nacia kaj kolonia problemo

3] *G. Brojdo*

Sed la disvolviĝo de kapitalisma mastrumo sur certa sia ŝtupo venigas al tio, ke kreita de burĝaro socio okazas en kontraŭdiro kun la interesoj de la novaj mastrum-formoj.

Financa kapitalo eliras ekster la kadrojn de ŝtatoj, konstruitaj de burĝaro. Avidante profitojn, burĝaro de unu ŝtato transportas sian agadon en aliajn ŝtatojn, en aliajn mondpartojn kaj en la interligo kun tio naskiĝas elementoj de la monda mastrumo.

Kaj en tiu ĉi periodo de kapitalisma disvolviĝo, kreita de burĝaro nácia socio fariĝas malhelpo sur la vojo al disvolviĝo de la nova mondmastrumo.

Fervojaro kaj akvo-vojoj kunligas ĉiujn partojn de la mondo.

Angla fabriko laboras per hindia kotono; el rusia lignaĵo estas konstruataj ŝipoj en ĉiuj marbordaj Eŭropaj landoj; amerikaj aŭtomobiloj veturas kaj en Afriko kaj en Azio, unuvorte la tekniko, la mastrumo surpaŝis la vojon por organizo de la monda mastrumo, nun dispecigita, disigita per la kadroj de ŝtatoj kaj nacioj.

En tiu ĉi periodo de mondmastruma disvolviĝo la nacio transformiĝas el la faktoro revolucia en la reakcian, el la faktoro akcelanta disvolviĝon de la produktaj fortoj de homaro — en la faktoron malrapidigantan ĉi disvolviĝon.

4. Ĉu la nacio ekzistos eterne?

Nacio naskiĝas kune kun la kapitalismo. Morto de la kapitalismo kondiĉigas ankaŭ morton de nacioj.

En la profundoj de kapitalisma socio embriiĝas la mastrumo monda. Ĝi postulas tutmondan socian organizon de la homaro, ĝin kontraŭdiras nacie disigita homaro. En profundoj de la kapitalisma sociordo embriiĝas organiziĝas kaj batalas por la monda mastrumo, por la internacia socio — la proletaro, kiu estas tombisto de la tuta kapitalisma sociordo kaj de ĝia nacia organizo. La devizo: "Proletoj de ĉiuj landoj unuiĝu!" estas la standardo, sub kiu la proletaro batalas kontraŭ la burĝaro por detruo de la bariloj, konstruitaj de la burĝaro inter proletoj de ĉiuj landoj, por detruo de la kadroj ĝenantaj disvolviĝon de la produktaj fortoj de la mondo. Konkiro de la regpotenco flanke de la proletaro, organizo de proleta ŝtato kreas la kondiĉojn necesajn ke la amasoj forvivu la naciisman ideologion de burĝaro, kun la helpo de kiu ĝi estis entiranta vastajn laboristajn kaj kamparanajn amasojn en la movadon, konforman al ĝiaj klasaj interesoj.

Kun finvenko de la proletaro la socio iom-post-iom forvivos la naciecan heredaĵon de burĝaro kaj sur la ruinoj de naciaj interbariloj, dividantaj la popolojn, ekregos la unueca homaro surbaze de la unueca organizita komunisma mastrumo.

Iom-post-iom estos mortantaj la restaĵoj de la nacieca ideologio, sed ili ludos la saman rolon, kiun ludas restaĵoj de tombejoj tie kie jam organiziĝis gentaj societoj, la saman rolon kiun ludas la antikva nobela blazono sur la domo de estinta bienulo, kie nun en soveta respubliko troviĝas popollernejo kaj laborista ripozdomo.

Loko por tiuj restaĵoj estas en la muzeo, kie infanoj de la komunisma socio per ili estos studantaj la epokon de nacia disigiteco, dispecigiteco, malpaco kaj de sangaj militoj de homaro.

Disvolvita komunisma socio ne scios naciajn formiĝojn, naciecajn rilatojn. Nacio mortos.

5. Do kio estas nacio kaj kiaj estas ĝiaj signoj?

El ĉio dirita ni vidas, ke nacio estas fenomeno historia, ke sur certaj evolu-gradoj de homa socio, kaj nome — en la epoko de leviĝanta kapitalismo, ĝi aperas kaj poste, kune kun ĝia evoluo kaj disfalo, ĝi evoluas, disfalas kaj mortas.

"La tuta historio estas historio de klasbatalo", sekve tian batalon prezentas ankaŭ historio de nacio. Historio de batalo inter du fundamentaj klasoj de kapitalisma socio — de proletaro kaj de burĝaro — trapasas ankaŭ la linion de disvolviĝo de nacio, sin montras en la nacia politiko de tiuj ĉi du klasoj.

La fundamenta signo de nacio tial estas ekzisto de kapitalismo. Sur la bazo de kapitalismaj mastrumformoj la homa socio ĝuste do formiĝas en nacion.

Tie, kie forestas la kapitalismaj mastrumbazoj, tie ankaŭ forestas nacio.

Disvolviĝo-grado de nacio difiniĝas de disvolviĝo-grado de kapitalismo.

Zirjanoj (komi) — prezentas embriiĝantan nacion, uzbekoj — tute difiniĝintan nacion, kaj poloj, germanoj — estas firmaj nacioj. Historie la klasa portanto de nacia disvolviĝo estas burĝaro. En fundo de ĝia nacia laboro kuŝas organizo de merkato, postulanta unuigon de homoj sur bazo de unueca lingvo — de tiu ĉi plej gravega ilo de soci-rilatoj, de unueca kulturo, kaj sekve ankaŭ de bezonoj. Ĉio ĉi kreas apogon por burĝaro de unu nacio en ĝia batalo kontraŭ aliaj grupoj de burĝaro.

Elrusigis *P. Jakovlev.*

Notinde estas, ke la protokolo de la intertrakto konstatas reciprokan kompreneblecon de la ambaŭ lingvoj, kaj tiamaniere subtenas niajn konsiderojn plifruajn, ke la reformoj de 10—15% de la lingvo-materialo fakte ne gravas ĉe tiom grava entute problemo, kia estas la universala akcepto de unu komuna lingvo.

Tiamaniere oni fakte en la intertraktado de esp-istoj kaj idistoj ne tiom zorgos pri la lingvo-perfektaĵoj, kiom pri la aplikaĵoj.

Eĉ se ni konsiderus la kamaradojn idistajn kiel niajn kontraŭulojn, — ni rajtas aserti — la batalado aŭ pli verdire la konkurado okazos sur tiu kampo, kiun ni ĉiam celis. Oni komencos ĝin en la pozicioj, kiujn ni ĉiam preferis.

Kaj ni opinias, ke tio estas granda kaj grava sukceso ne nur por ni, sed por la problemo de la praktika enkonduko de la Lingvo Internacia entute.

Mi finas tiun artikoleton per esprimo de sincera deziro, ke ankaŭ en aliaj unuiĝoj internaciaj laboristaj esp-istoj kaj idistoj zorgu pri starigo de interkonsentoj sur bazo simila. Per tio ni ne nur sukcesos montri ke la reciproka solidareco inter laboristoj estas grava kaj potenca faktoro, kiun ne povas forigi iuj bagatelaj lingvodemandoj aŭ iuj eraroj de la pasinto; — sed per tio ni samtempe multe antaŭenpuŝus la solvon de la tuta problemo pri la akcepto de unu komuna Lingvo Internacia.

Ernest Drezen, Moskvo.

LINGVAJ STUDOJ

Pensoj pri lingvo

1. Ĝermoj de lingvo komuna aperas kune kun ĝermoj de socialismo en malnova sociordo kaj oficialiĝos ili same kune nur per revolucio.
2. Ŝanĝoj en buŝlingvo kaj en skriblingvo okazas iom post iom paralele kun ŝanĝoj en sociordo, sed oficialiĝas ili nur per Revolucio (do subite).
3. Revolucioj en sociordo ĉiam paralelas kun revolucioj en lingvoj. Ekzemploj: 1) en Anglio militoj de kamparanoj en 14. jarcento kaj — nova prozlingvo, kreita de Uiklef, 2) en Germanio militoj de kamparanoj kaj — literaturlingvo de Luter, 3) en Rusio revolucio de 1917 — kaj dekreto pri simpligita ortografio, 4) en Rumanio revolucio de 1860 kaj — nova alfabeto latina, reformoj en lingvo, 5) revolucio de 1917 kaj — reformoj de ortografio en tataraj lingvoj de Sovet-Unio, 6) revolucio en nuna Mongolio kaj — nova alfabeto kaj reformoj en mongola lingvo, 7) militoj de kamparanoj en Ĉeĥio — kaj lingvaj reformoj de Gus, 8) revolucio en Bulgario 1922 kaj — enkonduko de nova ortografio ktp.
4. Estimemo al lingvoj de tiel nomataj grandaj kulturaj nacioj estas en esenco estimemo al ilia burĝkulturo.
5. Kiel laborilo lingvo estas kaŭzo de ŝanĝoj en sociordo, sed kiel sumo de komprenoj esprimataj per vortoj ĝi estas idea sekvo de ŝanĝoj en sociordo.
6. Penso sen vorto aŭ sen kaŝita formo de vorto (ĉe surdmutuloj, bestoj) ne estas ebla.
7. Vorto kreas kaj formigas la penson, ne male.
8. Suspektindaj estas ti-kiuj vokas marksismon por kontraŭi al sennacieco en lingvoj kaj en homrilatoj ĉar ili marksisme pravigas nur sian indiferenton aŭ malemon al Novo. En realo venkas volo naskata de bezono, sed ne malvarma teoriado, ne sagaca rezonado. Teorio bone servas al novanoj same kiel por malnovanoj, al bolŝevikoj same kiel por menjŝevikoj. Gardu vin kontraŭ delogoj de teorio!
9. Esperanto estas ne artefarita lingvo, sed komunigita kaj simpligita ĝis logikaj limoj naturlingvo.
10. Esperanto estas latinlingvo de proletaro.
11. Malamikoj de Esperanto neas raciigon en homlingvo.* Ili troigas rolon de spontaneco, de memkreiĝo en homlingvo. Sed ĝuste ĉi troigo estas nepra kaŭzo de oportunismo kaj cedemo en ĉiuj regionoj de homrilatoj. Do ĉi oportunismo en lingvo devas esti nevideble ligita kun oportunismo en politiko.

Maksim Krjukov.

KORESPONDADO

TARIFO

Korespondado: Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.ajo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la **devon, nepre** respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Argentino

— K-do *Bruno Gaggianesi,* Str. Méjico 3964, *Buenos Aires,* SAT-ano. 3659, PI, PM, bfl, pri ĉiuj temoj k. ĉ. l., tuj kaj ĉiam resp.
— K-do *Edmundo L. Doumerc,* Str. Agrelo 4079, *Buenos Aires,* dez. koresp. nur PI, PM. bfl, pri ĉiuj temoj k. ĉ. l., tuj kaj ĉiam resp.

Bulgario

— K-do *D. Kerekovski, S. Nasĉi Eski Dĵumajsko,* k. ĉ. l. L, PK, PI, pri kiu ajn temo kaj interŝ. fot-aĵojn kaj esp. gaz., ĉiam resp.
— *Ivan Ivanov,* instruisto en v. *Dolno-Suvanli* ĉe Ortakjoj, pri div. temoj, k. ĉ. l.
— K-do *Konstantin Kolev, urbo Ortakjoj-Drabiŝna,* dez. koresp. pri div. temoj, interŝ. vidaĵojn, fot-aĵojn k. PI. k. ĉ. l. Ĉiam resp.

Ĉekoslovakio.

— Geanoj de la Lab. Esp. Grupo "Estonteco" dez. koresp. pri politikaj kaj kulturaj temoj. Adreso: *"Lab. Esp. Grupo-Estonteco",* Arbeiterheim, *Bodenbach-Krochwitz.*

Francio

— K-do *Delalande,* 26, rue Etienne Dolet, *Orléans,* (Loiret) dez. koresp. L, PI, k. ĉ. l. Ĉiam resp.

Germanio

— K-do *Martin Riedel,* Moltkestr. 47, *Zwickau i. S.,* dez. koresp. L, PK, PI, k. ĉ. l.
— K-do *Kurt Lösch,* Annaberger Str. 110, *Chemnitz,* dez. interŝ. il. PK, precipe kun Anglio, Rusio, Polio, Italio, Svedio, Norvegio, Holando kaj Bulgario. Ĉiuj ricevas respondon.
— "Deziras interŝanĝadon de PM, k. ĉ. l. Sendu unue." Adr.: *H. Wolfschmitt,* Klenzestr. 99, I. r., *München.*
— Lernantoj de ĵus finita kurso serĉas korespondadon, PI, bfl, k. ĉ. l. Oni adresu al: *Kurt Bachmann, Schildesche b. Bielefeld,* Herforderstr. 2 u.
— K-dino *Elsa Teichmann,* Friedrichstr. 15, *Klosterlausnitz i. Th.* dez. koresp. pri ĉiuj temoj, k. ĉ. l.
— K-do *Walter Torner,* Flottwellstr. 18, I *Koenigsberg i. Pr.* dez. koresp. pri politika kaj lab. movadoj kun gek-doj en Francujo, Rusujo, Sudameriko, Afriko, Aŭstralio, Orienta Azio, L, PK, PI.

Hungario

— K-dino *Mario Turcsanyi,* VI Szondy u 62, I. 28, *Budapest,* dez. koresp. k. ĉ. l. gesamideanoj PK, PI, PM, bfl.

Sovet-Unio

— K-do *Joh. Ĉerenkov, Kalaĉ,* Voroneĵk. gub. pri pedagogio k. anarkismo, L, PK, PI, k. ĉ. l.
— K-do *Drjagin S. V.* (muzikisto), ul. Engelsa, 52, kv. 2, *Vjatka,* pri muziko kaj pri profes. vivo de ĉiul. muzikistoj.
— Unuiĝo de komunistoj-junuloj dez. koresp. kun ĉiulandaj komunistemaj k-doj kaj unuiĝoj pri junulara movado; adresu al *P. Ĉerniŝkov,* Malo-Elevatorskaja 27, *Rtiŝĉevo,* Sarat. gub., k. ĉ. l ĉiam respondas.
— K-dino *Isaeva Dario,* Bolŝ. Pesoĉnaja ul., *Serdobsk,* Sarat. gub., PKI, interŝ. fotografaĵojn.
— K-do *Georĝ Filipov,* Sov. Part. Ŝkola, *Novograd-Volinsk* (Ukrainio), pri prakt. sukcesoj kaj perspektivoj de esp-ismo, k. ĉ. l.

Alvoko al franclingvaj esp. komunistoj!

Nia tasko estas grava kaj urĝa! Ne prokrastu! Sendu viajn nomojn kaj SAT matrikulojn al k-do Otto Bässler. Ankaŭ anoncu vin por la laboro al k-do Soudant Robert en Biache St. Vaast (Pas-de-Calais).

Respondu al demandaroj kiujn mi plej baldaŭ sendos al vi.

La delegito por Francio
Robert Soudant.

NUR SE VI AĈETOS NIAJN AKCIOJN

kaj niajn librojn eldonitajn, ni povos plue aperigi ĉiujn tiujn belajn librojn, kies manuskriptojn ni posedas.

Helpu pliriĉigi nian literaturon, donante vian kotizon!

SAT-akciojn la administracio akceptas kiel validajn pagilojn.

ELDONA KOOPERATIVO DE SAT

Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas — Represo de artikoloj permesata nur, se oni citas la nomon de nia organo kaj sendas al Red. du ekz. de la represaĵo.
Jarabono: **Argentino** 6 pesos; **Aŭstrio** 120000 kr.; **Belgio** 36 fr.; **Brazilo** 13 milr.; **Britio** 110 penc.; **Bulgario** 220 lev.; **Ĉekoslovakio** 60 kr. ĉ.; **Danio** 10 kr. d.; **Estonio** 650 mk.; **Finnlando** 70 mk.; **Francio** 35 fr. fr.; **Germanio** 8 mk. or.; **Hispanio** 13 peset., **Hungario** 8 kr. or.; **Italio** 36 lir.; **Japanio** 4.50 jen; **Jugoslavio** 130 din.; **Litovio** 16 lid.; **Nederlando** 6 guld.; **Norvegio** 14 kr. norv.; **Polio** 8 zlot.; **Portugalio** 40 esk.; **Rumanio** 350 lej.; **Rusio** 4 rubl. or.; **Svedio** 8 kr. sved.; **Svisio** 10 fr. svis.; **Usono** 2.50 dol. — **Ankaŭ** 1/4 **jare abonebla. Ponumera prezo:** 0.20 mk.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG